

Gottfried Keller,
Pacon inter kreaĵoj

tradukita de Richard Schulz

Araneoj min naŭzadis,
Dum mi junulo estis,
De l' plafon' mallevigadis,
Sur la verto-haroj pestis,
Sidis aĉe enangule;
Aŭ kuregis tarantule,
Super manoj kaj vitrino.,
De l' mortig'ne estis fino.

Kiam la harar' griziĝis,
Tiam nur mi ilin lasis.
Pli trankvile mi fariĝis.
Ilin ne plu embarasis.
Kaj fratece ni nun vivas.
Mi ne plu ekofensivas.
Mi endome, ili rete,
Ĉiu agas nun diskrete.

Se mi havus infaneton,
Estus patro honorata,
Montrus mi la fajnan reton,
Al la zorge edukata,
Kaj instruus ĝin ekpreni
Araneojn per la mano,
Ree ilin ekmalteni.
Amus pacon la infano!

...

*Traduko de la Germana poemo "Friede der Kreatur" de GOTTFRIED KELLER (Gotfrido Kelero, *1819-07-09 – †1890-07-16) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26) en 1982-10-15.*

Arg-318-644 (2013-02-26 15:15:16)

Pri Rikardo Ŝulco kaj lia Analiza Skolo vidu ankaŭ: <http://www.ipernity.com/doc/37943/8965446> kaj http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

Pri Richard Schulz vidu la wikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.